



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16

EL « KIHOTO »

(Daŭrigo)

Kun siaj kontraŭstaraj levitaj tranĉantaj glavoj la du bravaj kaj koleraĵaj duelantoj ŝajnis minaci la ĉielon, teron kaj inferon: tia estis ilia kuraĝego kaj sinteno. La unua, kiu ellasis sian baton, estis la kolera Vasko, kiu frapis tiel forte kaj furioze, ke se la glavo ne estus deklinigita dum la bato, tiu ĉi sufiĉus por fini la senkompatan duelon kaj ĉiujn aventurojn de nia kavaliro. La bona sorto, gardinte lin por pli grandaj aferoj, devojigis la glavon de lia kontraŭulo, kaj trafante lian maldекstran ŝultron, ĝi, ne kaŭzis alian malbonon, ol sensirmigi lin en tiu korpoparto, fortrenante samtempe preskaŭ la tutan kapŝirmilon kaj duonorelon, ĉio, kio terure falis teren kaj lasis lin tre difektita. Dio min helpu, kiu povus nun ĝuste raporti pri la furiozeco, kiu enigis en la koron de nia Manĉo, ĉar li sin vidis tiamaniere traktita? Oni ne diru pli ol tio: li levis sin apogite sur la piedingoj kaj fortetenante la glavon per siaj du manoj, li tiel furioze batis sur la Vaskon, plentrafe sur la kusenon kaj kapon, ke malgraŭ lia bona ŝirmilo, kvazaŭ monto defalus sur lin, li komencis fluiĝi sangon el la nazo, buŝo kaj oreloj kaj teniĝi kvazaŭ li tuj ekfalos de la mulino, kio sendube estus okazinta, se li ne estus ĉirkaŭpreninta ĝin ĉe la kolo; malgraŭ tio li eligis la piedojn el la ingoj, elstreĉis poste la brakojn kaj la mulino, fortimigite de la terura glavbato ekkuris sur la kamparo kaj post malmutaj ĝibsaltoj forjettis teren sian mastron. Don Kihoto lin rigardadis tre malflame kaj vidante, ke li falis, li desaltis de la ĉevalo, rapidis al li kaj metinte al li la glavpinton antaŭ la okuloj, li ordonis, ke li sin deklaru venkita, se ne, li fortranĉos lian kapon. La Vasko, tre konfuzita, ne povis eĉ vorton respondi, kaj estus al li malbone, pro la blinda flamiĝo de don Kihoto, se la veturilaj sinjorinoj, ĝis tiam konsternegitaj per la duela rigardado, ne estus venintaj tien, kie li estas, kaj insiste petintaj don Kihoton, ke li faru al ili la grandan indulĝaĵon kaj favoron pardoni la vivon de ilia armservisto. Al tio

don Kihoto respondis tre emfaze kaj serioze: — Vere, belaj Sinjorinoj, mi estas tre kontenta fari tion, kion vi petas de mi, sed sub unu kondiĉo kaj konsento; ke tiu ĉi kavaliro promesos al mi iri en vilaĝon Toboŝon kaj sin prezenti al la senegala donja Dulcineo, por ke ŝi disponu el li laŭ sia plaĉo.

La simplenaj kaj senkonsolaj sinjorinoj, ne atentante kion don Kihoto postulis, nek demandante, kiu estas Dulcineo, promesis al li, ke la armservisto faros kion li aparte oni ordonos al li.

— Nu, fidante al via parolo, mi ne plu faros al li malbonon, malgraŭ ke li ja tion meritis.

El la hispana tradukis
VICENTE INGLADA.

Opinioj pri sango kaj sablo

(El «*Esperanto*», organo de U. E. A.)

Kiu ne havis okazon ĝis nun legi tiun ĉi verkon en la originalo aŭ eltiron naciligvan el ĝi de tiu plej fama verkisto moderna de Hispanujo, nun povos tion fari en Esperanto. La aŭtoro estas majstra priskribanto de popolo, kutimo, moro, ludo, doloro, ĝojo, spirito kaj animo hispana. Kristalklare, alloge, impone, kvazaŭ vivante, prezentiĝas al ni Hispanujo en lia verko. Pri lia eminenteco ekzistas nur unuanimeco ĉe ĉiuj konantoj. Ne estas mirige, ke ankaŭ en eksterlando la nombro de liaj amikoj estas grandnombra. La tradukinto majstre kaj elegante, en malfacilaj kazoj ekstreme lerte, prilaboris tiun ĉi faman verkon. Ĝi estas plena de aro da teknikaj esprimoj, kiuj evidente necesigis cerbumadon sufiĉe longan. Restis nur iuj, detaletoj, kiuj estas kritikindaj laŭ gramatika aŭ lingva vidpunktoj. Kiel tuto la verko estas bonega kaj gratulinda eldonaĵo. Ĝi meritas imiton por pli-grandigo de l' vere valora literaturo en nia lingvo. Parenteze ni aldonas, ke papero, tipografio kaj plurkolora kovrilo (kun tipaj hispanaj scenoj) estas unuaklasaj. Resume: verko, kiu ne nur ornamas la libroŝrankon, sed kiun oni devas aĉeti por esti inter ĝiaj legintoj.

N. C.

« N I A G A Z E T O »

Ĉi tiu esperanto-gazeto, eldonata en Francujo, kies formato estas $43'5 \times 31'5$ centimetra, konsistas el multaj paĝoj ilustritaj per belaj fotografajoj kaj estas redaktata de profesiaj gazetistoj nome: Georges Avril, S. Grenkamp-Kornfeld, Julio Baghy ktp., kies nomoj estas ja tre multe konataj en Esperantujo kaj garantias la bonstilon kaj altan intereson de la enhavo.

La abonejo en Hispanujo por ĉi tiu te grava, ĉiumonata gazeto estas "Aragona Esperanto-Federacio" — strato Roda 10, Zaragoza—, do ĉiuj hispanoj dezirantaj ĝin aboni faru la abonpeton pere de ĝi.

Jarabono por hispanoj: 12 Fr.

ESPERANTO-FONTO

Eble kelkaj legantoj de Heroldo rememoras, ke apud Budapest Esperanta sekcio de Naturamika Societo el Ujpest konstruis el ŝtono krudan fonton kaj donis al ĝi la nomon: Esperanto-fonto. Mi uzis la okazon de sunbrila dimanĉa tago por viziti tiun fonton. Vojaĝante per fervojo unu horon de Budapest, mi ekvidis jam ĉe la stacio de l' vilaĝo, kie mi elvagoniĝis, malgrandan tabuleton kun plano de la ĉirkaŭaĵo, kiu montris la vojon al la Esperanto-fonto. Ĝi estas unu el la plej gravaj ekskurslokoj de la tiera ĉirkaŭaĵo, kaj per ĝi la vorto Esperanto enradikiĝis inter la amaso de turistoj, kiuj ĉiudimanĉe kaj festotage ekskursadas en la belega ĉirkaŭaĵo de la hungara ĉefurbo.

Forlasinte la fervojlinion kaj irante tra beletaj ĝardenstratoj de somera refreŝiga loko, kie multaj novaj vilaoj montras, ke ĉiam pli da homoj serĉas konstantan ripozejon dum la someraj monatoj, mi baldaŭ marŝis jam sur argila kampvojo, kiun daŭrigis en arbaro pli mallarĝaj vojoj. Ĉie estis freŝa verde, florornamo, birda trilado, insektoj flugetis ĉirkaŭ la floroj, branĉoj, kie araneoj teksis siajn fadenojn. La suno varmege brulis tra la folioj sur la haŭto, sed la bona aero senpolva, florodora, la bela pejzaĝo forgesigis la malgrandajn malagrablojn. Post traire de la arbaro etendiĝis antaŭ mi bela pejzaĝo, kun ontoj en la fono. Jam estis videbla la plej alta el la Budaaj montoj, la Pilis, kaj, proksime de ŝtonega monta muro, la valo, en kiu devas esti la Esperanto-fonto. Maldekstre montriĝis la malgranda vilaĝo Csév, al kiu apartenas la fonto. Nun vojo kondukis tra diversaj kampoj, kulturitaj per diversaj grenoj, kreskaĵoj, plantaĵoj. Tritiko, sekalo, aveno kliniĝis amike apud la kampovojeteto. Sed la kampoj ne estis ebenaj; kvazaŭ ondoj de maro estis la tero.

Supren-malsupren, jen iris la vojeto inter multkolora floraro. Fine arbitaja vojeto kaj mi jam aŭdis gajajn sonojn. Multaj turistoj, naturamikoj, societoj ripozis tie proksime al la fonto, kiu estas en valeto, ĉirkaŭmasonita per ŝtonoj. Elspruĉas

A V I S O

A todos los socios de Frateco que reciben NIA VIVO, se les ruega se sirvan ponerse al corriente en el pago de sus cuotas

freŝa akvo el tubeto. La fonton fermas fera por-do, kiu portas la kvinpintan stelon kaj hungaran surskribon pri la fonto kaj ĝia konstruintaro, kiu meritas laŭdon kaj dankon de la esperantistaro, pro tio ke ili starigis malproksime de la urbo tian memorigilon pri nia lingvo kaj tiamaniere popularigis ĝin en vasta rondo. Jen loko kie Esperanto praktike donas agrablan utilon.

P. B.

LITERATURAJ KONKURSOJ

Frateco aranĝis du literaturajn konkursojn; unu por ĉiuj hispanaj esperantistoj, kaj alia nur por Fratecanoj, sed speciale aranĝita por la komencantoj, celante inciti ilin je la verkado en Esperanta lingvo.

Reguloj por la unua konkurso:

1.^a Ĉiuj hispanaj esperantistoj povas ĝin partopreni.

2.^a Oni donos du premiojn por la du verkoj, kiuj, laŭ opinio de kompetenta juĝantaro, estos la plej perfektaj, ĉu gramatike, ĉu bonstile.

a) "La Faraono" (3 volumoj) por la Esperanta originala rakonto pri iu ajn temo, ne pri-traktanta sociajn, religiajn aŭ politikajn aferojn.

b) "Kataluna Antologio" por la plej bona tradukaĵo en Esperanto de la jena soneto de Lope de Vega:

"A CAMILA LUCINDA

Daba sustento a un pajarillo un día
Lucinda, y por los hierros del portillo
fuésele de la jaula el pajarillo
al libre viento en que vivir solía.

Con un suspiro a la ocasión tardía
tendió la mano, y no pudiendo asillo,
dijo, y de las mejillas amarillo
volvió el clavel que entre su nieve ardía:

"¿A dónde vas? ¿Por despreciar el nido
al peligro de ligas y de balas,
y el dueño huyes que tu pico adora?"

Oyóla el pajarillo enternecido,
y a la antigua prisión volvió las alas;
¡que tanto puede una mujer que llora!"

Oni donos ankaŭ unu subpremiion, ankoraŭ ne difinitan, por ĉiu kiu ĝin meritos.

3.^a Oni devas sendi la verkojn en fermita koverto kun devizo, per klaraj literoj, se estas eble maŝinskribite, kaj kun ĉi tiu surskribo: "Por la unua konkurso", kaj ili devas esti ne pli longaj ol kvin folioj maŝinskribitaj nur unuflanke. La grandeco de la folioj devas esti proksimume 22×16 centimetroj.

Reguloj por la dua konkurso:

1.^a Nur povas partopreni ĝin la Fratecanoj.

2.^a Oni donos kiel premion la verkon de Dr. Zamenhof "Fundamenta Krestomatio", por la tradukaĵo en Esperanto de rakonto aŭ literatura artikolo, de hispana aŭtoro, kiu laŭ opinio de la sama juĝantaro estos la plej perfekta gramatike, komparante la lingvan kompetentecon kun la esperantisma antikveco de la konkursantoj. Tial devos ĉiu konkursanto skribi sur la papermargeno la ĝustan aŭ proksimuman daton en kiu li komencis la studon de la lingvo.

3.^a Ĉi tiu regulo estas la sama kiel tiu por la

unua konkurso. La surskribo de la verkajoj devos esti: "Por la dua konkurso". La aŭtoroj devos meti kune kun la tradukaĵo la originalan hispanan verkon. Tiuj ne pritraktos sociajn, religiajn nek politikajn temojn.

Limtempo por sendi la verkon estos en ambaŭ konkursoj la 31an. de Marto de 1936. Oni ne interkorespondos pri la senditaj verkajoj, nek ili estos resendataj al la aŭtoroj.

La premiitaj verkoj estos publikigataj en NIA VIVO. La adreso por sendi la verkojn estas nia Societa hejmo: Roda, 10, principal, Zaragoza.

Kandia la historia urbo de Kreta

Kandia estas unu el la plej pentrindaj havenoj de la insulo Kreta. Ĝia malsufiĉa fundo malhelpas la eniron de la grandaj ŝipoj, kaj nur vidiĝas apud ĝiaj malgrandaj kajoj modestaj ŝipetoj por apudborda marveturo kaj la ankoraŭ pli humilaj de la fiŝkaptistoj, tiuj barkoj kiuj eliras tagiĝe kaj revenas dum la vesperiĝo.

Plie Kandia havas sian riveron, rivereton kiu verŝas siajn malabundajn akvojn ne malproksime de la haveno.

Ĝi estas urbo de turka aspekto kun siaj moskeoj, kioskoj kaj vendejoj de orienta pura tipo. En ĝia ĉefa placo estas la arĥeologia muzeo kie oni konservas la artajn trezorojn kiujn la tero de Kreta liveris al la arĥeologio.

Nun ĉio estas paco kaj silento en Kandia, sed ekzistis epoko dum kiu ĝi estis scenejo de gravaj militagoj. La haveno kie nun ripozas la ŝipetoj kaj barkoj de fiŝkaptistoj, estis antaŭ kelkaj jarcentoj militŝipa bazo kaj apud la nova parto de la urbo, kun ĝiaj modernaj domoj kaj ĝia vivo de laboro kaj paco, vidiĝas la antikva, kun la ruinoj de ĝiaj muregoj sur kies ŝtonojn la tempo skribis paĝojn de sango kaj milito.

Tiu ĉi murego datiĝas de la venecia superregado, la epoko de plej granda beleco, kiam konis Kandia.

Malmultaj postsignoj restas de tiu periodo. La latina katedralo estas unu el ili; alia, la preĝejo de Sankta Francisko, en ruina stato.

Knossos, antikva ĉefurbo de la insulo, troviĝas tre proksime de Kandia, pli malpli unu kilometron. En tiu ĉi loko oni faris fruktodonajn elfosojn kiuj malkovris, en la jaro 1898, la ruinojn de la reĝa palaco de Minos.

Kiam la venecianoj ekokupis Kandia, kies fondiĝo apartenas al la araboj, ili solide fortikigis ĝin kaj, dank' al tio ĝi povis elteni dum dudek jaroj la sieĝon de la turkoj.

Komenciĝis ĉi tiu militfarajo kiam la generalo Baudren kaptis mahometanan marpilgrimadon kiu iris al la Meka. La pilgrimantoj estis malliberigitaj en Kandia kaj poste ili estis translokitaj al Mata. La turka suvereno Ibrahim respondis per milita deklaro kaj elŝipigis en Kreta armeon de 50000 soldatoj kiuj sieĝis ĝin kaj mitilakiris plurajn urbojn.

Jeronimo Merosini alvenis al Kreta estrante militŝiparon por defendi la urbon kontraŭ la turkaj atakoj kaj rifuĝis en Kandia. La malamikoj sieĝis lin kaj Merosini rezistis heroe ĉiujn atakojn

kontraŭ li direktitajn de la malamikoj dum dudek jaroj.

Sed en la jaro 1669 Merosini kapitulaciis. Kandia estis jam aliformigita en amaso da ruinaĵoj kaj apud la muregoj estis perdintaj la vivon 31000 venecianoj kaj 118000 turkoj.

L. TIL.

EPIGRAMO

Jen traduko je klasika kaj fama poeziaĵo humora el Vicente Espinel; aŭtoro ankaŭ de la tut-hispana metrika kombinaĵo montrata de la strofo mem:

En Francuj' portugal' miris,
Vidante, ke ne dubŝance
Eĉ la geknabetoj france
Tutkorekte ĉion diris.
"En tion sorĉart' eniris",
Li diris, liphartordante,
"Ĉar francan lingvon lernante,
Maljuniĝas portugal',
Kaj knab' ĉi tie laŭ mal'
Plentrafas, ĝin parolante".

M. VÁZQUEZ.

RAPORTO PRI VOJAĜO al 27^a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

(Daŭriĝo)

Capri estas insuleto kuŝanta en la Napola golfo, ĝi estis scenejo de tre konata filmo ludita de Jan Kiepora kaj pro tio tiu insulo estas ĉie konata. La kongreso veturis al Capri per 3 vaporŝipetoj, la krozadeto estis tre ĉarma, ĉar Mediteranea Maro malofte koleras. En la insulo multaj kongresanoj nur havis tempon por manĝi en restoracio, sed ni uzis ruzon kaj per ŝnurvagono iris al pinto de la insulo, de kie oni povas vidi vastan panoramon. Ankaŭ ni vizitis tre elegantan vilaĝon starantan ĉe la supraĵo de la insulo.

La 10an Aŭg. nokte ni estis en la ŝipo Sinaia por adiaŭi niajn krozadanajn geamikojn, tie ni estis gaje kunrinketante, kantaĉante kaj babilante ĝis malfruenokta horo. La ŝipo forlasis la Napolan havenon dum ĝia loĝantaro estis dormanta.

Kaj nun venas la plej valora periodo de nia vojaĝo. Ni jam estas tute izolataj kaj laŭ nia plaĉo ni vizitos urbojn aŭ lokojn per tre rabatitaj fervojaj biletoj. La dimanĉon 11an Aŭg. ni restis en Napoli kaj ekskursis matene al vulkano Vesuvo. Jen bela stranga ekskurso. Per elektra vagonaro ni veturis frumatene al bazo de la vulkankonuso, kie estas ŝnurvagono, kiu je kruta vojo suprengrimpas malrapide ĝis la supraĵo de tiu vulkano, ankoraŭ la vizitanto devas marŝi piede kaj en la plej alta loko oni trovas krateron, kiu konsistas el vasta profundaĵo, kies vertikalaj nigraj muroj iam rompiĝis por permesi, ke lafo amase eliru malsupren. Ĉe la fundo de la kratero nigra lafo ŝtoniĝis deŝegnante kapricajn faldojn. Ie estas fendoj flamantaj, de aliaj fendoj elbloviĝas sufokaj gasoj. Multaj vizitantoj ne kuraĝis piedmarŝi sur la kra-

tero, sed mia edzino kaj mi, akompanataj de gvidisto malsupreniris laŭ zigzaga vojeto signita de blanka kalko, sur nigran varman lafon, kiu ŝtoniĝinte flosas sur flua materio... Peza marŝado inter malbonodoraj gasoj ĝis atingo de du grandaj truoj eljetantaj cindron, gasojn kaj laferojn kun ofta muziko de tondraj bruoj. Estas impona neforgesebla spektaklo, kiun povas kompreni nur tiu, kiu iam vidis ion similan.

11an Aŭg. vespere ni veturis de Napoli al Venezia, kiun ni atingis 12an matene. Pri tiu urbo ni multe aŭdis kaj legis, sed ĝi surprizis nin. Estas vera strangajo vidi urbon, kie anstataŭ stratoj estas kanaloj, urbo kie anstataŭ ĉevalveturiloj estas tipaj boatoj, kie anstataŭ aŭtobusoj estas motorŝipetoj. La granda kanalo estas kurba akvovojo larĝa kaj tre longa, okupata de ĉiaspecaj boatoj kaj ŝipetoj. La urbo estas aro de insuletoj kunligataj de multenombraj pontetoj. Ĉe ekstremo de la Granda Kanalo estas marlago barita de insuloj, unu el ili estas la banloko "Lido" tre eleganta kaj bonaspekta kvartalo, kie estas bonaj restoracioj, dancejoj kaj aliaj someramuzejoj. Nokte ni faris romantikan promenadon per boato tra mallarĝaj multtelumaj tipaj kanaletoj, kie silento estas kortuŝa kaj pro tio estas pli rimarkataj la kantoj de la boatistoj kaj iliaj avertkrioj ĉe ĉiu kanaleta angulo por eviti puŝon de kontraŭvenanta boato.

Proksime de Venezia ankaŭ en la norda regiono de Italio estas Milano. Laŭ mia juĝo ĝi estas la vera ĉefurbo de la lando, ĉar ĝia aspekto de laborema urbo, ĝiaj puraj bonaspektaj stratoj, ĝiaj komercaj kaj industriaj entreprenoj montras ke, kvankam la politika regado estas en Romo, la ekonomia mastrumado estas en Milano. Unu el plej tipaj lokoj el Milano estas la "Galleria Vittorio Emanuele" kiu konsistas el du stratoj sinkrucantaj laŭ 90° angulo, kiuj estas kristaltegmentaj kaj pro tio komforta loko por promeni babilante dum tro varmaj aŭ malvarmaj tagoj. En tiuj salonstratoj estas ambaŭflanke luksaj vendejoj, restoracioj, trinkejoj k. t. p.

Post dutaga restado en Milano ni iris al Torino, urbo pli kvieta, sed bela kun imponaj antikvaj konstruaĵoj kaj tre vasta parko apud rapidflua rivero. Sekvantan tagon ni forveturis al Francujo, per fervojo kuŝanta en ĉarmaj valoj, apud montoj ankoraŭ kovrataj de vintra neĝo.

Vespere ni atingis la francan urbon Marseille, kiu estas en Eŭropo la "Pordo de Oriento" ĉar en ĝia haveno alborde ĝas la plimulto el la ŝipoj irantaj al proksima kaj malproksima oriento, en tiu urbo ni vidis trapaŝanton el plej diversaj rasoj kun eksotikaj kostumoj, kiuj ne altiras atenton pro kutimo vidi ilin. Multaj laboristoj kaj francaj soldatoj en Marseille estas negroj. Ni restis en Marseille tri tagojn, ĉar ĝi prezentis sin al ni, kiel tre simpatia urbo. Matene ni iris nin bani en malproksiman banlokon, kies irvojo kuŝas alte apud la maro. Unu tagon posttagmeze ni iris per motorboato al insulo, kie staras la kastelo If, famkonata pro la romano de Dumas "La Grafo Montecristo". Ni tre kontentaj restadis en Marseille, ĉar multe ŝatas la francan kuiradon kaj tiu urbo pro stratoj kaj vendejoj similas al Paris. Ankaŭ en Francujo ni ne trovis lingvajn malfacilaĵojn, ĉar ambaŭ konas sufiĉe la francan lingvon.

De Marseille ni veturis al Barcelona kaj post

restado en tiu de ni multe ŝatata urbo, ni finfine revenis al Valencia, kie rapide mi pretigas fotografajojn kaj raportojn por sendi al niaj gekorespondantoj.

FERNANDO BOSCA.

Valencia.

REVO

Dum ni iris la vojeto borderita de arboj, ĉe unu el kies flankoj kuris murmuranta rivereto, la aŭtuna vento forprenis flavajn foliojn puŝante ilin kun murmuro sur niajn piedojn.

Ni iris tre kune; ŝi kaj mi. Ni revis... Nia penso nin transportis tre malproksimen... ĝis tiu tago, kiam unuafoje ni vidis nin... ĝis tiu tago, kiam unuan fojon maskiĝis en niaj koroj dolĉaj nekomprenblaj... la amo!...

Ne parolante, ni vidis rebrili, sur la akvo, la preskaŭ senfoliaj branĉoj de la arboj kun iliaj akraj anguloj...

Ni daŭrigis paŝi, plu kaj plu, ĝis loko, de kie oni vidis, malproksimen la ruĝan turon de la preĝejo... ĝis kie estis tiu benko, kiu sciis ĉiujn niajn promesojn kaj ĉiujn niajn sekretojn.

Ni vidis la lokon, malgaja, senhoma, tapiŝata de velkintaj folioj kaj pli granda timo eniris niajn korojn.

Ni kredis vidi kvazaŭ la finon de unu amo kaj, ni sentis tial timon!... estis tiel elokventa la pejzaĝo!... ke senvole ni rigardis nin reciproke kaj tamen ni ridetis... Ĉar, ne!, nia amo neniam povos morti. Por ĝi ne ekzistas aŭtuno nek vintro nek somero. Ĝi estis ĉiam, bela kaj dolĉa printempo!...

Kaj dum la vento ankoraŭ forprenis el la arboj la foliojn, kiuj surnaĝis sur la rivereto, ni promesis al ni mem eternan amon per longa kiso.

Tiel, malproksime, la turo de la preĝejo ankoraŭ profilis sian ruĝan silueton sur la grisan ĉielon.

F. CRUZ DE LA ROSA.

SPRITAĴOJ

Du sinjoroj fervoĝante en San Sebastian'on parola pri siaj filoj kaj unu el ili demandas la alian.

Ĉu vi havas filon?

Certe, sinjoro, mi havas unu.

Ĉu li estas bona filo?

Jes, li estas tre bona.

Ĉu li fumas?

Oh ne! En sia vivo li neniam prenis cigaron.

Almenaŭ li iras en Kafejon. Ĉu ne?

Ne, sinjoro, li neniam iras en Kafejon.

Mi gratulas vin. Ĉu li ankaŭ ne eliras dum nokte?

Ne, post kiam li manĝas li iras por dormi.

Sinjoro, vi havas bonegan filon, denove mi gratulas vin. Ĉu vi povas diri al mi kiom aĝa li estas?

Jes, sinjoro, li estas dujara.

LUIS AZCONA.